



RIMTRIPTIKO

Zhang Heng Lusin Guozhu
Esperantigis S.J.Zee kaj Guozhu

2008 Ĉinio

Riminvito

Rimtriptiko, poema trio,
kanto de tri ĉinaj aŭtoroj.
Floroj kun nesamaj koloroj,
bunte mikstona melodio.

Zhang Heng en trist-melankolio.
Lusin ŝercas pri misfuroroj.
Rimtriptiko, poema trio,
kanto de tri ĉinaj aŭtoroj.

Ĉar mankas al Guozhu genio,
sekve ne malmultas doloroj,
per komputilo en laboroj.
Sed finvenko en parodio,

Rimtriptiko, poema trio.

诗歌三重奏，作者中国人。鲜花呈异彩，音调亦缤纷。
张衡赋四愁，妙语自鲁迅。诗歌三重奏，作者中国人。
国柱学电脑，傻瓜少才能。历经磨难后，天道终酬勤。
诗歌三重奏，作者中国人。

Zhang Heng (76-139)

KVAR TRISTOJ

Mia kara vivas ĉe Taishan-monto.
Vojkruto baras al nia renkonto.
Easten rigardas mi kun larmfonto.
Ŝi donacis al mi inkrustan spadon,
rekompence mi jardon al ŝi sendis.
Sed la vojo tro longa sin etendis.
Mia ĉagreno atingis altgradon.

我所思兮在太山，
欲往从之梁父艰。
侧身东望涕沾翰。
美人赠我金错刀，
何以报之英琼瑶。
路远莫致倚逍遥，
何为怀忧心烦劳。

Mia kara vivas ĉe Guilin-grundo,
sed renkonton baras akvo-profundo.
Suden rigardas mi kun larm-abundo.
Ŝi donacas al mi geman liuton,
rekompence al ŝi paron da pletoj.



Sed la vojo tro ĝenas sen diskretoj.
Sinĝene mi sentas ĉagren-akuton.

我所思兮在桂林，
欲往从之湘水深。
侧身南望涕沾襟。
美人赠我琴琅玕，
何以报之双玉盘。
路远莫致倚惆怅，
何为怀忧心烦快。

Mia kara vivas ĉe Hanyang-tero,
sed renkonton baras voja danĝero.
Ŭesten rigardas mi kun larm-livero.
Ŝi donacas al mi zibelmantelon,
rekompence perlon al ŝi repagis.
Sed la vojo tro penige zigzagis.
Sufere mi sentas hezitan pelon.

我所思兮在汉阳，
欲往从之陇阪长。
侧身西望涕沾裳。
美人赠我貂襜褕，
何以报之明月珠。
路远莫致倚踟蹰，
何为怀忧心烦纒。

Mia kara vivas ĉe Yanmen-pordo,
sed nian renkonton baras neĝ-hordo.
Norden rigardas mi kun larm-senordo.
Ŝi donacas al mi silkan brokaton,
rekompence al ŝi jaspon prezentis,
Sed la vojo tro veige turmentis.
Malĝoje mi sentas ĉagren-dilaton.

我所思兮在雁门，
欲往从之雪雰雰。
侧身北望涕沾巾。
美人赠我锦绣段，
何以报之青玉案。
路远莫致倚增叹，
何为怀忧心烦惋。

Trad. Guozhu
2008-09-27



Lusin (1881–1936) 鲁迅

Mia Fiasko en Amo 我的失恋

—*Nova parodio en klasika stilo* —拟古的新打油诗

Mia amatino vivas sur montflanko
kaj viziti ŝin malhelpas vojomanko.
Senkonsole mi kliniĝas kun plorvango.
Ŝi donacas al mi beldesegnan ŝalon.
Rekompence strigon mi al ŝi resendis.
Ŝi koleris tre kaj min ne plu atentis.
Mi stultiĝis ne sciante la kialon.

我的所爱在山腰；
想去寻她山太高，
低头无法泪沾袍。
爱人赠我百蝶巾；
回她什么：猫头鹰。
从此翻脸不理我，
不知何故兮使我心惊。

Mia amatino---en bazar' homplena.
Viziton malhelpas la amaso ĝena.
Kapon levas mi kun larmo korĉagrena.
Ŝi donacis bildon de hirundparo.
Rekompence mi bombonon al ŝi sendis.

Ŝi koleris tre kaj mi ne plu atentis.
Konfuziĝe mi ne scias la kialon.

我的所爱在闹市；
想去寻她人拥挤，
仰头无法泪沾耳。
爱人赠我双燕图；
回她什么：冰糖壶庐。
从此翻脸不理我，
不知何故兮使我糊涂。

Mia amatino vivas ĉe rivero.
La profundo min disigas de la celo.
Senkonsile dronas mi en korsufero.
Ŝi donacis oran ĉenon kun medalo.
Rekompence aspirinon mi alsendis.
Ŝi koleris tre kaj min ne plu atentis.
Mi maldormas ne sciante la kialon.

我的所爱在河滨；
想去寻她河水深，
歪头无法泪沾襟。
爱人赠我金表索；
回她什么：发汗药。
从此翻脸不理我，
不知何故兮使我神经衰弱。

Mia amatino vivas en grandstilo.
Ŝin viziti mankas, ve! aŭtombilo.
Mi skuante kapon restas sen konsilo.
Rozon jen donacis mia amatin'.
Rekompence mi serpenton al ŝi sendis.
Ŝi koleris tre kaj min ne plu atentis.
Mi ne scias la kialon---lasu ŝin!

我的所爱在豪家；
想去寻她兮没有汽车，
摇头无法泪如麻。
爱人赠我玫瑰花；
回她什么：赤练蛇。
从此翻脸不理我，
不知何故兮一一由她去罢。

La 3-an de oktobro. 1924. 一九二四年十月三日。

Trad. S.J.Zee. **Sovaĝa Herbaro** p.13/14

La 5an de novembro 1931, en sia antaŭparolo al la angla eldono de
Sovaĝa Herbaro, Lusin skribis ke por moki poemojn pri fiasko en amo
siatempe furorajn, li versis tiun ĉi parodion.

一九三一年十一月五日鲁迅先生在《野草》英文译本序中说过：因为讽刺当时盛行的失恋诗，作《我的失恋》。



Guozhu(1938-)

Novico Antaŭ Komputilo

☆傻瓜学电脑四咏
(1993-02-14)

1.

Mirinda komputilo ĉiopova,
al klerulo kiel trezoro nova,
anstataŭilo de plumo elprova.
Vidante ĝin mi iĝis korinklina,
kaj adore komputilon frekventis.
Sed panee ĝi min ne plu atentis.
Bad! mi dronis en konfuzo senfina.
神通广大微电脑，
文房又添新一宝。

书生“换笔”恨不早。
一见PC便倾心，
立诉肺腑认知音。
忽然电脑不理我：
Bad!不知何故兮，使我惊心。

2.

Komputilo imponas nin per famo
de miloj da labirinta programo.
Kie estas la pasvorto "sezamo"?
Kiel komencanto lernas singarde,
kvazaŭ sur glacio paŝas sensperte.
Sed komputilo insultas averte:

Error! denove mi kulpas hazarde.

科技忒高微电脑，
程序万千眼花撩。
“芝麻开门”太难找。

初学电脑倍当心，
正襟危坐如履冰。
忽然电脑警告我：

Error!不知何错兮，使我忧心。

3.

Frida komputilo kun koro fera,
por stulta novico --- sfinkso severa,
neforgesebla vivsperto sufera.
Mi memlernas ĉiam kun granda pio,
kvazaŭ peti sutrojn iras pilgrime.

Sed komputilo rifuzas deprime.
Not! Mi plorĝemas pro la tragedio.

冷面铁心微电脑，
傻瓜失误岂能少？
动辄得咎免不了。
自学电脑倍虔心，
如上西天求真经。
忽然电脑拒绝我：
Not!不知何处兮，使我伤心。

4.

Sen uz' ne konas pri ĉia averto.
Eraroj kondukas al prava certo.
El spertoj naskiĝis eksperta lerto.
Persistas mi en lernado obstine.
El senirej' saviĝi mi sukcesas.
Subite la komputilo min jesas.
Ok! la finvenko min ravas senfine!

不打不识微电脑，
错误正好是先导。
吃堑长智熟生巧。
锲而不舍倍专心，
疑无路处亮红灯。
忽然电脑回答我：
Ok!天道酬勤兮，使我开心！